# Encuentro mundial de trabajadores sin barreras lingüísticas

## 81ª congreso de la Asociación Mundial Anacional (SAT) en Kazanlak, Bulgaria

**(Traducción de Cani)**

**Del 9 al 16 de agosto de 2008, 80 trabajadores de 14 países y 3 continentes se han reunido una vez más para desarrollar su asociación, intercambiar información y experiencias sobre cuestiones sociopolíticas de todo el mundo y entablar amistad y nuevos proyectos. El programa ha sido interesante.**




**Foros sociales**

Han tratado temas, como el hambre en el mundo, la acción sindical y la ayuda a los inmigrantes, posibles soluciones a la crisis mundial social y del medio ambiente, la situación sociopolítica en los países exsocialistas y la explotación en el paraíso capitalista; la declaración congresual esboza los principales puntos y conclusiones provisionales de esos debates.

**Desarrollo de la actividad de SAT.**

Para ampliar la democracia interna de la asociación y los contactos con compañeros que no tengan internet se desarrollará una red de grupos de SAT, es decir, grupos de miembros más o menos cercanos que se reúnan para organizar contactos locales con otras organizaciones obreras y para discutir cuestiones asociativas internas.

SAT continúa con fuerza su actividad antiarmamentística llamando a los estados a firmar la convención de Ottawa y la futura convención de Oslo. SAT lanza una ambiciosa campaña que pretende editar folletos en diversas lenguas sobre la actividad cultural mundial de SAT. De acuerdo con ese papel cultural de SAT se ha decidido la organización de sesiones culturales sobre administración de páginas web y sobre gestión económica, para facilitar a los miembros la autogestión en su actividad cotidiana tanto dentro como fuera de SAT.

La editora cooperativa, después de su arranque con la edición de diversos elementos propagandísticos, camisetas, algunos folletos y el primer libro, "La pena de muerte", ha publicado dos libros más en su nueva colección «La Memoria Obrera». "La Comuna de París de 1871" ha sido escrita en colaboración con los Amigos de la Comuna de París de 1871, y presenta, además de un esbozo histórico sobre uno de los episodios más interesantes de la historia obrera, artículos sobre personajes concretos, que permiten profundizar un poco en algunos de los aspectos del episodio. "El Socialismo Italiano y el Esperanto" presenta el debate sobre el esperanto en las páginas de las revistas socialistas italianas en 1918, en el que desempeñó un papel muy influyente Antonio Gramsci. Los documentos históricos se completan con tres diferentes contribuciones actuales sobre la actualidad contemporánea del debate. La mayoría de los que han colaborado son miembros de la sección esperantista de la asociación sociocultural italiana Arci. Otros tres libros están ahora en preparación y otros cinco proyectos se han esbozado durante el congreso.

esperanto

# Tutmonda laborista renkontiĝo sen lingvaj baroj

## Jen la 81a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Kazanlako, Bulgario

**De la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2008, 80 laboristoj el 14 landoj kaj 3 kontinentoj kuniĝis plian fojon por evoluigi sian asocion, interŝanĝi informojn kaj spertojn pri socipolitikaj okazaĵoj ĉirkaŭ la mondo, amikiĝi kaj starigi novajn projektojn. La programo estis riĉa.**

**Komunika komitato de SAT**

**Sociaj forumoj**

Ili pritraktis temojn, kiel mondan malsaton, sindikatan agadon kaj helpon al enmigrintoj, eblajn solvojn al tutmonda naturmedia kaj sociala krizo, socipolitikan situacion en postsocialismaj mondopartoj kaj ekspluatadon en kapitalisma paradizo; la kongresa deklaracio skizas la ĉefajn trajtojn kaj provizorajn konkludojn de ĉi-tiuj debatoj.

**Disvolvo de SAT-agado**

Por ampleksigo de la interna demokratio kaj de kontaktoj kun kamaradoj sen retaliro disvolviĝas reto de SAT-rondoj, t.e. grupo de samregionaj membroj kiuj kuniĝas por organizi lokajn kontaktojn kun aliaj laboristaj organizoj kaj pridiskuti internajn asociajn aferojn.

SAT vigle daŭrigas sian kontraŭarmilan agadon alvokante ŝtatojn al subskribo de konvencio de Otavo kaj onta konvencio de Oslo. SAT lanĉas ambician kampanjon kiu celas eldoni diverslingvajn informilojn pri la kleriga tutmonda rolo de SAT. Kongrue kun tiu kleriga rolo de SAT estis decidita organizado de klerigaj sesioj pri retejmastrumado kaj asociaj financoj, por ebligi al la membraro esti memstara en sia ĉiutaga agado en kaj ekster SAT.

La eldonkooperativo, post ekfunkciado per eldonado de diversaj varbiloj, T-ĉemizoj, kelkaj broŝuroj kaj unua libro, "Mortopuno", aperigis du novajn librojn en sia nova kolekto «Laborista Memoro». "La Pariza Komunumo de 1871" estis redaktita kunlabore kun la Amikaro de la Pariza Komunumo 1871, kaj prezentas, aldone al historia skizo pri la unu el la plej riĉaj epizodoj de la laborista historio, artikolojn pri kelkaj apartaj roluloj, kiuj ebligas iom pliprofundigi kelkajn el la aluditaj aspektoj. "La Itala Socialismo kaj Esperanto" prezentas la debaton pri Esperanto en la paĝoj de la italaj socialismaj gazetoj en la jaro 1918, en kiu aparte influan rolon havis Antonio Gramsci. La historiajn dokumentojn kompletigas tri malsamstilaj nunaj kontribuoj pri la plua aktualeco de la debato. Plej multaj el la kunlaborantoj anas en la Esperanta fako de la itala socikultura asocio Arci. Tri pliaj libroj estas nun en preparo kaj kvin aliaj projektoj ekburĝonis dum la kongreso.